

Heinrich Heine,
[Ne scias mi, kio okazis]
tradukita de Paul Gottfried Christaller

El la “Libro de la kantoj”, parto “La Reveno”.

Ne scias mi, kio okazis
al mia tristema kor’:
Antikva legendo min kaptis,
ne cedas el mia memor’.

La Rejno fluadas trankvile
murmuras kiel mister’,
la supron ŝtonegan orumas
sunbriloj de la vesper’.

Plej bela virgino jen sidas
mirinda sur la montet’
kaj ŝia oraĵo radias,⁴
ŝi logas kiel magnet’.

Ŝi kombas la oran hararon
abundan per ora kombil’,
kantante misteran lidon,⁵
ravantan kiel sunbril’.

...

Heinrich Heine,
Lorelej’
tradukita de Leopold Elb

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne
estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.*

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor’.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor’.

Vespero jam ekmalheliĝas,
Fluadas la Rejn’ en trankvil’,
La supro de l’ monto lumiĝas
En vespersuna bril’.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar’,
La belan vizaĝon kronas
Mirinde la ora harar’.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi’.

...

Heinrich Heine,
Die Lorelei

Ich weiß nicht, was soll es bedeuten,
daß ich so traurig bin;
ein Märchen aus alten Zeiten,
das kommt mir nicht aus dem Sinn.

Die Luft ist kühl und es dunkelt,
und ruhig fließt der Rhein;
der Gipfel des Berges funkelt
im Abendsonnenschein.

Die schönste Jungfrau sitzet
dort oben wunderbar,
ihr goldnes Geschmeide blitzet,
sie kämmt ihr goldenes Haar.

Sie kämmt es mit goldenem Kamme,
und singt ein Lied dabei;
das hat eine wundersame,
gewaltige Melodei.

...

⁴En la sube menciita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: “kaj sia oraĵo radias”, kun “sia” anstataŭ “ŝia”. Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

⁵En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto “liedon”, kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

Ŝipisto en sia ŝipeto
kaptiĝas per stranga dolor',
la rifon li tute ignoras.
atentas nur ŝin kun fervor'.

Kaj sopiregon eksentas
Ŝipisto dum sia vetur';
Rifaron li ne priatentas,
Al monto rigardas li nur.

Den Schiffer im kleinen Schiffe
ergreift es mit wildem Weh;
er schaut nicht die Felsenriffe,
er schaut nur hinauf in die Höh.

Mi kredas: la ondoj englutas ⁶
ŝipiston, ŝipeton je l' fin',
kaj kulpa pri tio nur estas
kantado de la virin'.

Mi kredas, ke dronos finfine
Ŝipisto kun sia boat',
Kaj tion kaŭzis fine
La Loreleja kantad'.

Ich glaube, die Wellen verschlingen
am Ende Schiffer und Kahn;
und das hat mit ihrem Singen
die Lorelei getan.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (*1860-08-21 – †1950-12-31).*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1823.*

Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

Arg-2-2 (2014-04-23 18:09:02)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: "Buch der Lieder", Abschnitt "Die Heimkehr". - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la wikipedia retejo http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller, kun foto de li.

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

Aus dem Werk "Buch der Lieder", Kapitel "Die Heimkehr", Abschnitt II. Siehe auch ein <http://guttenberg.spiegel.de> unter: http://guttenberg.spiegel.de/?id=5&xid=1131&kapitel=12&cHash=eb14eca2272#gb_found. Vidu ankaŭ: http://www.gedichte.vu/?die_lorelei.html. La melodion verkis la komponisto Friedrich Silcher. Vidu la retejon http://www.lieder-archiv.de/die_lorelei-notenblatt_300493.html.

⁶Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.